

Wilhelm Hey,

## Ĉu vi scias la kiomon

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ĉu vi scias la kiomon  
de la steloj super ni?  
Ĉiu havas sian nomon,  
ilin konas nia Di'.  
La Sinjoro, kiu tronas  
super ĉio, ilin konas;  
|:kaj la nombron scias Li.:|

Birdoj flugas tra l' aero,  
ĉu vi scias, kiom da?  
Bestoj vivas sur la tero,  
estas ege multaj ja.  
Dio ĉiujn ekvivigis,  
la estaĵojn Li estigis.  
|:Ĉiuj bestoj laŭdu Lin.:|

Multaj estas la infanoj,  
ĉu vi scias kiom da?  
Ĉiuj estas en la manoj  
de la kara Dio ja.  
Li ja scias la kiomon,  
kaj Li konas ĉies nomon,  
|:amis ĉiun, ankaŭ vin.:|

...

*Traduko de la Germana poemo "Weißt du wieviel Sternlein stehen" de WILHELM HEY (\*1789-03-26 – †1854-05-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1983.*

*MR-057 / Arg-737-1488 (2012-12-28 23:20:57)*

*La melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/WeisstDu.html>. Tie troviĝas ankaŭ angligo de la kanto-teksto.*